Ferreira F & Engelhardt PE (2006). Syntax and production. En: MJ Traxler & MA Gernsbacher (Red.), Handbook of psycholinguistics. 2nd edition (pp. 61-91). Amsterdam, The Netherlands: Elsevier.

Finkbeiner M, Nicol J, Greth D & Nakamura K (2002). The role of language in memory for actions. Journal of Psycholinguistic Research, 31, 447-457.

Garrett MF (1975). The analysis of sentence production. En: G Bower (Red.), Psychology of learning and motivation: Vol. 9 (pp. 133-177). New York: Academic Press.

Gennari SP, Sloman SA, Malt BC & Fitch WT (2002). Motion events in language and cognition. Cognition, 83, 49-79.

Griffin ZM & Ferreira VS (2006). Properties of spoken language production. En: MJ Traxler & MA Gernsbacher (Red.), Handbook of psycholinguistics. 2nd edition (pp.21-59). Amsterdam, The Netherlands: Elsevier.

Gumperz JJ & Levinson SC (1996). Rethinking linguistic relativity. Cambridge: Cambridge University Press.

Hamilson JK, Wynn K & Bloom P (2007). Social evaluation by preverbal infants. Nature, 450, 557-560.

Hilberg W (2010). Vera pensmaŝino: Reprezentado kaj manipulado de vortoj kaj pensoj en neŭrona retaĵsistemo. Scienca Revuo, 61, 195-204.

Levelt WJM (1989). Speaking: From intention to articulation. Cambridge, MA: MIT Press.

Levinson SC, Kita S, Haun, DBM & Rasch, BH (2002). Returning the tables: Language affects spatial reasoning. Cognition, 84, 155-188.

Nagata H (2011). Psiĥolingvistikaj kritikoj pri la Hilberg-a antaŭsupozo por la "vera pensmaŝino." Scienca Revuo, 62, 125-129.

Papafragou A, Massey C & Gleitman L (2002). Shake, rattle, 'n' roll: The representation of motion in language and cognition. Cognition, 84, 189-219.

Slobin DI (1996). From "thought and language" to "thinking for speaking." En: *JL Gumperz & SC Levins* (Red.), Rethinking linguistic relativity (pp. 70-96). Cambridge: Cambridge University Press.

Slobin DI (2000). Verbalized events: A dynamic approach to linguistic relativity and determinism. En: S Niemeier & R Diren (Red.), Evidence for linguistic relativity (pp. 107-138). Amsterdam, The Netherlands: John Benjamins.

Spelke ES (1985). Preferential looking methods as tools for the study of cognition in infancy. En: *G Gotlieb & N Krasnegor* (Red.), Measurement of audition and vision in the first year of postnatal life. *Norwood, NJ: Ablex.*

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA
Department of Clinical Psychology
Kawasaki University of Medical Welfare
288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO
<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Vorto en bildo: lingva komunikado en la mezepoka arto

Dariusz TABOR

Enkonduko

La vorto estis la plej grava instrumento de komunikado en la Mezepoko. Oni povus diri, ke la Mezepoko estis bazita sur la vorto. La vorto kreis kulturon kaj formis la pensmanieron de homoj. La vorto de la Mezepoko venis de la Biblio. La Biblio estis la fonto de la Vorto. Se la vorto estis la kreanto de la kulturo, ne estas mirige, ke ĝi aperis ankaŭ en bildoj. Efektive, mezepokaj bildoj estas pentritaj de la vorto.

Oni konstatas la unuarangecon de la Vorto en la mezepoka kulturo. Lingva komunikado estis la fundamento de la civilizacio. Sed, kial oni klopodis prezenti la vorton en bildo? Kial oni penis esprimi lingvon per bildo? Tio rezultis de la speciala deziro vidi la vorton. Vidado de la Vorto, kiu estas Kristo, estas unu el la plej gravaj karakterizaĵoj de la Mezepoko. Homoj de la Mezepoko deziris vidi sanktaĵojn: la eŭĥaristion, relikviojn. Tiu strebado enskribiĝis en pli profundan sintenon, kiu estas kontemplado. Kontemplado de vorto restis la bazo, sur kiu kreiĝis la verkoj de arto, kiuj havis la mision prezenti, vidigi vortojn, lingvon kaj komunikadon.

En la sekva artikolo estas analizitaj ses verkoj de la mezepoka arto, en kiuj estas perceptebla la temo de vorto. Ili aperas en ĥronologia ordo.

Bildo 1: Sankta Mateo

La miniaturo prezentas la evangeliiston Mateon, kiu sidas sur trono kaj skribas tekston en malfermita libro. Mateo estas altranga persono. Li portas togon. Tio signifas, ke li ludas gravegan rolon.

Kial la skribanto estas signita per imperiaj atributoj: trono, togo? Tio estas ligita kun la fakto, ke Mateo verkas la tekston, kiu estas esenca por la kulturo de la Mezepoko. La ago de skribado, la aga-

do de registrado de vortoj estis la fundamenta fakto de la kulturo. La kulturo de la Mezepoko ekzistis, ĉar tekstoj, inkluzive de tiuj



Bildo 1: Sankta Mateo, kiu aŭdas kaj komunikas vorton (*Skubiszewski*, 2011, p. 138-139)
Fonto: Evangelilibro de *Lindisfarne* (Britio), ĉirkaŭ 700, karto 25, dorsopaĝo.

de la evangelio, estis skribe registritaj. Se la tekstoj estas skribitaj, ili ne estos perditaj. Evangelio skribita estas evangelio komunikita. La unua etapo de komunikado estas skribado. La verkanto, Mateo, estas la ĉefrolanto de la komunikado prezentita en la bildo.

Sed aperas la demando: de kie Mateo prenas la vortojn, kiujn li registras en sia libro? Ni trovas respondon en la miniaturo. Super Mateo estas anĝelo. Li blovas trumpeton. La ago de la anĝelo estas simbola. Blovi trumpeton en la Mezepoko signifis proklami mesaĝon. La anĝelo proklamas la bonan novaĵon, kiun Mateo aŭdas kaj skribe registras. Tio estas la unua etapo de la komunikado, kiu estas procezo longa kaj komplika.

Ni observas, en la sama bildo, ankaŭ la lastan etapon. Disĉiplo de Mateo ŝovis la kurtenon. Kurteno simbolas misteron. Ni rimarkas, ke Mateo, sidanta sur la trono, estis kaŝita malantaŭ la kurteno. Nun la kurteno estas forŝovita, kaj la evangeliisto kun sia libro estas rivelita. La disĉiplo malkovris la evangeliiston, kaj tio signifas, ke la enhavo de la libro estas komunikita. La disĉiplo ricevas la mesaĝon kaj li tenas libron. Lia libro havas la saman enhavon kiel la libro de Mateo. Do, la procezo de la lingva komunikado, prezentita en la bildo, engaĝas kelkajn protagonistojn.

Bildo 2: Egberto ricevas libron

Libro estis universala simbolo en la kulturo de la latina Eŭropo. Libro estis grava kaj baza lingva komunikilo. Ĝi estis valora objekto, trezoro. Havi libron, porti libron signifis esti grava persono, esti kultur-persono kaj havi grandan povon. Kiu havis libron, povis proklami, anonci mesaĝon.

La miniaturo el la kodekso de Egberto prezentas specialan situacion. Ni vidas la arĥiepiskopon de Treviro, Egberton. Li sidas sur trono.

Bildo 2. La verkintoj prezentas siajn librojn. La arĥiepiskopo Egberto ricevas la librojn. (*Mayr-Harting*, 1999, p.79-83)
Fonto: *Codex Egberti* (la Kodekso de Egberto), 977-993.

Ĝis la tempo de la skribado de kodekso – ĝis la tempo de la imperiestro Otono – oni ne prezentis episkopojn sidantajn sur trono. Egberto komencas novan epokon kaj novan rolon de episkopo. La episkopo ricevas imperiestran atributon. Tio signifas, ke li alprenis novan socian funkcion. Li estas instruisto kaj organizanto de la socia vivo.

En la momento prezentita en la bildo, Egberto ricevas librojn. Ni vidas du skribistojn – *Keraldus* (Keraldon) kaj *Heribertus* (Heriberton). Ili preparis du librojn por la episkopo kaj ili dediĉis al li tiujn librojn.

Kion signifas dediĉi libron? Tio signifis doni libron je dispono, sed ne nur la libron, sed ankaŭ la enhavon de la libro. Ekde tiu momento Egberto estis la disponanto de la libro kaj de la enhavo. La skribistoj-monaĥoj transdonis la enhavon de la libro al la episkopo, kaj tiu transdonos ĝin al la kredantoj. Libro estis instrumento de lernado, de politiko kaj de liturgio. Tiu, kiu havis libron, povis transformi la vivon kaj krei civilizacion.

Bildo 3: Papo Gregoro

La protagonisto de tiu miniaturo estas la papo Gregoro la Granda – teologo, verkisto, protagonisto de la religia vivo en la tempo de migradoj de popoloj. Li sidas sur trono. Trono estis atributo de romanaj imperiestroj. Oni prezentadis imperiestrojn el la saksa dinastio – Otonon la Unuan, Otonon la Duan kaj Otonon la Trian – sidantaj sur tronoj. La papo Gregoro la Granda sidas sur trono. Tio signifas, ke lia pozicio estas sama, kiel tiu de imperiestro. La krono, kiu pendas super lia kapo, kaj la arko, en kiu li troviĝas, substrekas lian gravecon.

Sed la papo havas ankaŭ atributojn, kiuj ne apartenas al imperiestro. Tio estas libroj – fermita libro kaj malfermita libro. Libro estas portilo de mesaĝo. La du libroj estas simbolaj objektoj. Gregoro, kiu havas du librojn, povas transdoni mesaĝon aŭ reteni la enhavon. Alian simbolon ni vidas sur la brako de Gregoro. Tio estas kolombino, simbolo de la Sankta Spirito.

La komunikado prezentita en la bildo komenciĝas ĉe la Sankta Spirito. La papo Gregoro estas peranto. Lian mesaĝon ricevas la sekretario, kiu observas la papon. Li tenas tabulon kaj skribilon. Li aŭdas tion, kion transdonas la papo kaj li skribas sur la tabulo.

Bildo 3. La papo Gregoro, kiu aŭdas la diktatajn vortojn kaj kiu diktas la vortojn. (*Mayr-Harting*, 1999, s. 31-32)
Fonto: *Registrum Gregorii*, 983-987.

Bildo 4: La legendo pri *Sibilla Tiburtina*

La miniaturo prezentas legendon, enskribitan en la unua ĉapitro de la libro de la leĝo de Magdeburgo. En la bildo estas prezentita la romia imperiestro Oktaviano Aŭgusto. Li dormas kaj li havas sonĝon. En la sonĝo li vidas virinon kun infano. La imperiestro ne komprenas tion, kion li vidas. Tial li alvokas profetinon – virinon, kiu estas kapabla kompreni kaj interpreti viziojn, sonĝojn kaj vortojn. Ŝi estas *Sibilla Tiburtina*. Ŝi respondas al la alvoko de Oktaviano Aŭgusto kaj interpretas la sonĝon: la virino, kiu aperas en la vizio, naskos filon. Li estos la Savinto de la homoj.

Estas interese, ke la fundamenta kaj mistera mesaĝo estas komunikita per bildo. Bildo estas grava instrumento de komunikado. Bildo portas mesaĝon. Sed bildo devas esti komprenata. La bildo, en kiu estas prezentita la virino kun infano, ne estis komprenebla por la imperiestro Oktaviano Aŭgusto. Tial estis bezonata inter-

Bildo 4. Virino, kiu interpretas sonĝon. *Sibilla* klarigas al Oktaviano Aŭgusto la vizion pri virino kun infano. (*Tabor*, 2008, s.237-240, 290-291)
Fonto: *Blume des Sachsenspiegel*, 1397, *Legnica* (Silezio), karto 14, dorsopaĝo.

pretisto, kiu ekspliku la sencon de la vizio. La interpretistino estas en tiu bildo la protagonisto de la komunikado. Sen ŝia ago la mesaĝo ne estus komunikebla kaj komprenebla. La interpretistino, *Sibilla Tiburtina*, uzas lingvon. Ŝi tradukas la formojn kaj kolorojn de la bildo en vortojn kaj frazojn de la lingvo.

La vizio de Oktaviano Aŭgusto, tradukita kaj interpretita de *Sibilla*, prezentas *Maria*-n – la Patrinon de Dio, kun la Infano Jesuo. *Maria* estas ĉirkaŭita de radia nimbo.

La bildo en la libro de la leĝo de Magdeburgo havas specialan funkcion. La legendo pri *Sibilla Tiburtina*, kiu anoncas en la vizio la Patrinon de Dio, ligas la antikvan romanan tradicion kun kristanismo. La kreintoj de la leĝo de Magdeburgo estis konvinkitaj, ke tiu havas la fonton en la imperia tradicio de Romo kaj en kristanismo.

Bildo 5: La vorto, kiu fariĝas karno

Jen miniaturo, troviĝanta en kodekso enhavanta la legendon pri sankta *Hedviga Silezia*. La miniaturo dividiĝas en tri partojn. La supra parto prezentas Dion Patron, kiu sidas sur trono kaj sendas la arĥiangelon Gabrielo kun misio kaj kun mesaĝo al *Maria*. La arĥiangelo devas transdoni la mesaĝon, komuniki vorton.

En la malsupra parto de la bildo oni vidas la arĥiangelon Gabrielo, kiu surgenuas antaŭ *Maria* kaj transdonas la mesaĝon. Sed

aperas la demando: Kiun antaŭdiras Dio Patro? Kiun anoncas la arĥiangelo? Ni trovas la respondon en la tria parto de la bildo. En la centro de la bildo ni vidas Dion Patron, kiu portas la suĉinfanon Jesuon. Dio sendas lin al la mondo. La suĉinfano Jesuo estas la Vorto de Dio. Tio signifas, ke Dio Patro antaŭdiras la Vorton-sian Filon, kaj la arĥiangelo Gabrielo anoncas la Vorton-Jesuon.

Bildo 5. Dio Patro sendas Gabrielon, Dio Patro tenas la Filon, Gabrielo transdonas mesaĝon al *Maria*. La vorto, kiu fariĝis karno.
(*Der Hedwig-Kodex von 1253*,, 1972, diversloke)
Fonto: Kodekso de *Lubin* (Silezio). La legendo pri sankta *Hedviga Silezia*, 1353, karto 167, dorsopaĝo.

La interpreto de tiu bildo indikas du nivelojn de komunikado. La unua nivelo estas la lingva nivelo. Dio Patro parolas al la arĥiangelo, uzante lingvon. Gabrielo transdonas la mesaĝon al *Maria* pere de lingvo. La lingvo, ne bildo, estas la plej grava kanalo de komunikado inter Dio kaj la homaro, en la mondo de la Biblio. La

dua nivelo estas la teologia nivelo. Lingvo estas nur komunikrimedo. Sed kia estas la enhavo? La enhavo de la komunikado en tiu bildo ne estas abstrakta nocio, ĝi ne estas komplika doktrino. La enhavo de la komunikado inter Dio Patro kaj *Maria* estas persono. En la centro de la bildo Dio tenas la personon Jesuo, kiu estas la enhavo de la komunikado. La Vorto estas persono. La lingvo komunikas Jesuon.

En la mezepoka kulturo oni kutimis komuniki la Vorton-Filon de Dio. Ĉi tiu miniaturo estas interpreto kaj ilustro de la verko "*Expositio sancti Bernardi abbatis super Evangelium, Missus est Angelus*" ("Klarigo de sankta Bernardo, la abato pri la Evangelio, Sendita estas Anĝelo") de *Bernard de Clairvaux*. En la teksto Bernardo komentas la dialogon de la arĥianĝelo kun *Maria* en la evangelio de sankta Luko. Tiu komento estas priskribo de la procezo de enirado de la Vorto-Filo de Dio en la historion de la homaro.

Bildo 6: Reĝa tombo

En la katedralo de la reĝa kastelo *Wawel*, en Krakovo, troviĝas la tomba monumento de la pola reĝo Kazimiro la Granda. La figuro de la mortinta reĝo kuŝas sur la monumento. Super la figuro estas baldakeno. La tombo de Kazimiro estis objekto de studado kaj de interpretado; nin interesas la maniero, laŭ kiu estas prezentitaj la viroj sidantaj sur la septoj aŭ vandoj de la tombo. La flankaj vandoj estas dividitaj je kvar fakoj. En ĉiu el la fakoj troviĝas viro, kiu sidas kaj diskutas kun la aliaj viroj. Oni facile rekonas la diskutsituacion, ĉar la rilatoj inter la personoj kaj gestoj tion atestas. La scenoj en la fakoj de la tombo estas prezentitaj en formo de eksterordinaraj kaj interesaj bareliefoj. La skulptanto prezentis la dialogon kaj interŝanĝon de ideoj. La interparolantaj viroj uzas lingvon, kaj tiu uzo de lingvo estas prezentita en la skulptaĵo, ĝi estas priskribita per rimedoj de plastikaj artoj. La prezentaĵo portas gravan mesaĝon. Por legi tiun mesaĝon oni devas scii, kiuj estas la viroj, kiuj sidas kaj diskutas. Ili estas konsilantoj, membroj de la reĝa konsilantaro. Ili havas malfacilan problemon por solvi: la reĝo Kazimiro la Granda mortis, kaj li estis la lasta reprezentanto de la dinastio. La konsilantoj serĉas respondon al la demando: kiu estus la nova reĝo de Pollando? Kia estus la estonteco de Pollando? Kion oni devus fari por konservi la ekziston de la reĝlando?



Bildo 6. Tomba monumento (Konsilantoj, kiuj diskutas pri la estonteco de la reĝlando) (*Skibiński, Zalewska-Lorkiewicz*, p. 370-372)
Fonto: Tombo de Kazimiro la Granda, reĝo de Pollando, en la katedralo de la reĝa kastelo *Wawel*, en Krakovo. Ĉirkaŭ 1370.

Ĉiuj demandoj estas esprimitaj per gestoj kaj korpopozicioj de la konsilantoj. La rolo de la konsilantaro estas tre grava en la tempo post la morto de Kazimiro la Granda. Tiu grupo preparas la transvivon de la politika sistemo de la reĝlando kaj transiron al nova epoko. La fondinto de la monumento intencis plifirmigi la agadon de la grupo da konsilantoj, tial li ordonis skulpti la bareliefon.

Konkludo

La analizitaj bildoj estis elektitaj kiel ekzemploj de prezentado de lingva komunikado en la mezepoka arto. En tiu epoko oni kreis multnombrajn bildojn, en kiuj lingva komunikado estis prezentata per artaj rimedoj. La mezepoka arto uzis tri gravajn ilojn de prezentado de lingva komunikado: gestojn, korpopoziciojn kaj objektojn.

La bildoj analizitaj en la artikolo reprezentas kelkajn manierojn de prezentado de lingva komunikado en la mezepoka arto. Unu el la manieroj koncentriĝas je perado de mesaĝo. Tiu perado estas dufaza: la vorto venas de Dio, pere de anĝelo, kolombino aŭ alia simbolo, kaj ĝi estas direktita al grava persono. La gravulo, siavice, transdonas ĝin al homoj.

En iuj prezentaĵoj la vorto estas prezentita kiel persono, Jesuo. Alia prezentomaniero koncernas la interpreton de bildo, kaj la vorto havas en tiutipa arto eksplikan rolon. Alia el la prezentokonvencioj emfazas la rolon de libro, kiu estas la plej grava objekto en la komunikprocezo en la mezepoka arto. Libro estas la plej multsignifa simbolo. Libro estas integra simbolo kaj ŝlosilsigno.

Iuj mezepokaj artaĵoj prezentas komunikajn situaciojn, en kiuj troviĝas homoj. La temo de ilia komunikado ĉiam estas tre grava.

Mezepokaj artverkoj vidigas vortojn, lingvon kaj komunikadon. Tiu ĉi trajto de la mezepoka kulturo estas menciita en verkoj pri arto, sed ĝis nun ne estis esplorita en apartaj studoj. Tial estas dezirinda daŭrigado de tiutema esplorado.

Bibliografio

Der Hedwig-Kodex von 1253: Sammlung Ludwig, 1972 ed. Braunfels, Berlin 1972

Mayr-Harting Henry, 1999, *Ottonian Book Illumination: an historical study. Part one.* London, 1999

Mayr-Harting Henry, 1999, *Ottonian Book Illumination: an historical study. Part two*: Books. London, 1999

Tabor, Dariusz, 2008, *Malarstwo książkowe na Śląsku w XIV wieku.* Kraków, 2008

Skibiński, Szczęsny; Zalewska-Lorkiewicz, Katarzyna, 2010, *Sztuka polska: gotyk.* Warszawa, 2010

Skubiszewski, Piotr, 2011, *Sztuka Europy lacińskiej od VI do IX wieku.* Lublin: TN KUL, 2011

Tiun ĉi tekston akompanas retpaĝo, en kiu oni povas vidi la priparolitajn bildojn koloraj: http://www.esperanto-reto.org/studenta - bv. elekti: Sciencaj artikoloj.

Adreso de la aŭtoro

Dr. habil. Dariusz TABOR
Uniwersytet Papieski Jana Pawła II
ul. Sławkowska 32
PL 31-014 *Kraków* / POLLANDO
<dariusesp@gmail.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro lekcias en la Papa Universitato Johano Paŭlo la 2-a, en Krakovo, Pollando. Li specialiĝas pri la arto de la Mezepoko.

Kibernetika socio-psiĥologia modelo de la homo

Zlatko TIŜLJAR

Antaŭparolo

Sub la supra titolo mi jam antaŭ jaroj prelegis kaj preparis manuskripton por publikigo en Scienca Revuo – fakte por la Festkajero 4/2007 okaze de la centjariĝo de ISAE. Danke al la daŭra puŝado de la redaktoro de Scienca Revuo estiĝis nun ne nur scienca artikolo, sed ĉ. 40-paĝa libro en DIN A-4 formato, kies titolo fine estas EKZISTADO*. En ĝi estas multaj skemoj (kiel en la antaŭaj artikoloj pri la sama temo) kaj, ĉar mi mem kreis ilin en *WORD*, mi ne kapablas ŝanĝi ilin tiel, ke facilus malgrandigi ilin ekz. al formato DIN A-5. Mi krome ne scias, ĉu Scienca Revuo havas tioman spacon, ke ĝi povus aperigi 80 paĝojn de mia libro (kiam oni transformas ĝin al A-5). Mi do donas por publikigo en Scienca Revuo nur la tekston de la Konkludo, kiu iel resumas la antaŭajn 7 ĉapitrojn de mia libro pri ekz. kibernetikaj principoj kaj metodoj, pri lingvistiko, pri la baza 4-nivela skemo, vivekzemploj kaj kiel sistemigi la mondon.

Enkonduko

Mi lernis iom pri psiĥologio kaj estis tre nekontenta. Oni diras en ĝi, ke la homo havas emociojn kiel ĥolero, ĝojo, timo, kiuj estas elektroĥemiaj procesoj en la cerbo kaj mezureblaj. Tion ĉi infano scias, ke ni havas emociojn. Ĉu neniu provis iel ordigi, sistemigi la emociojn? Kiam kaj en kiuj kondiĉoj aperas unu, kaj en kiuj aliaj? Krome oni malofte distingas klare inter homo kiel socia estaĵo (sociologio) kaj homo kiel individuo (psiĥologio).

Fiziko observas la leĝojn de la naturo kaj ne demandas sin, ĉu la konduto de la universeroj havas iun sencon. Kibernetiko antaŭmetas la celon. Elektromagneto havas la celon, kiel eble plej longe

* *Zlatko* TIŜLJAR: "Ekzistado. Priskribo de Totaleco". Originale verkita en Esperanto. Eldonis: Inter-Kulturo, *Maribor* 2011, kun kora dediĉo al d-ro *Rüdiger Sachs*, kiu daŭre stimulis min fini la verkon.